

Czesław Miłosz,  
Vi forta nokt'

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Vi forta nokt', al vi ja etendiĝas  
nek ombro nek nubaro nek incendi';  
vi lumas, kvazaŭ hela tago iĝas.  
Dormante vian voĉon aŭdas mi.

Vi estas nokt'; en am' kun vi kuŝante  
estontajn bataladojn vidis mi.  
La plebo ne rimarkas ĝin dormante.  
Eksonas vitreriga melodi'.

Potencaj malamikoj estas ĉie.  
Amata, vi fidelas al la ter'.  
La vento pelas nigran branĉon ie,  
el obskurejo blovas la aer'.

En viaj molaj manoj, vi Mortiga  
boneco ega estas kaj saĝec'.  
Ekbrilas iu lumo pliheliga,  
ne disvolviĝis jam de l' lun' plenec'.

*Traduko de la Pola poemo "Ty silna noc" de CZESŁAW MIŁOSZ (\*1911-06-30 - †2004-08-14) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1903-06-14.*

MR-064-1 / Arg-739-1493 (2012-12-30 11:59:37)

Pri la poeto vidu la vipediaĵon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Czesław\\_Miłosz](http://eo.wikipedia.org/wiki/Czesław_Miłosz).

Czesław Miłosz,  
Ty silna noc

Ty silna noc. Do ciebie nie dosięga  
ni płomień ust, ni chmur przejrzystych cieni.  
Słyszę twój głos po ciemnych snu okręgach  
i świecisz tak, jakby nadchodził dzień.

Ty jesteś noc. W miłości leżąc z tobą  
odgadłem los i bojów przyszłych zło.  
Ominie plebs, a sława przejdzie obok  
i pryśnie muzyka jak butem tknięte szkło.

Wrogowie mocno są, a ziemia nazbyt wąska  
i ty, kochana, jesteś wierna jej.  
U ziemskich wód czarnego bzu gałązka,  
wiatrem przygnana z niewiadomych kniej.

Ogromna mądrość, dobroć niekobieca  
jest w twoich kruchych rękach, o Śmiertelna.  
I blask poznania na czole prześwieca:  
stulony księżyc, nirozwita pełnia.

*Verkinto de tiu ĉi Pola poemo estas CZESŁAW MIŁOSZ (\*1911-06-30 - †2004-08-14).*

Arg-739-1492 (2012-12-30 12:04:22)

Vidu *ankau:* <http://agataaa13.blog.pl/2004/09/09w-nocy-mam-moc-najpiekniejszej-krolewny/#comments>.